

# Kiel svisaj, danaj kaj aliaj esperantistoj prisilentas la judecon de Zamenhof

Kvankam la funkciuloj de la koncernaj landaj asocioj certe scias, ke Zamenhof estis de juda deveno, ili obstine prisilentas tiun fakton kaj daŭre skribas en siaj asociaj retujoj, ke Zamenhof estis „rusa-pola kuracisto“ (svisa kazo) aŭ „pola okulisto“ (dana kazo).

Precipe en la svisa kazo tio estas kurioza, ĉar la koncernaj aktivuloj certe konas la ekziston de la ampleksa Zamenhof-biografio de Andreas Künzli, kiun li verkis speciale por priskribi kaj emfazi la judajn elementojn kaj facetojn de Zamenhof. Cetere, ekzistas ankaŭ aliaj Zamenhof-biografioj en Esperanto, kiuj akcentas tiun fakton. Evidente, tiuj biografiaj havis nulan influon en la Esperanto-movado. Oni do devas konstati, ke tiuj esperantistoj ignoras kaj tiujn biografiojn kaj la fakton, ke Zamenhof estis judo.

Oni devas konstati, ke certaj e-istoj ankoraŭ ne komprenis, ke Zamenhof estis judo, kaj nenio alia ol judo, do li ne estis polo nek ruso.

Kial Zamenhof ne estis polo aŭ ruso, mi klarigis en pluraj okazoj, ekzemple en la artikolo legebla sub [http://www.planlingvoj.ch/Esperanto\\_pola\\_heredajo.pdf](http://www.planlingvoj.ch/Esperanto_pola_heredajo.pdf).

Oni do devas bedaŭri, ke tiuj esperantistoj daŭre malatentas kaj ignoras la historiajn faktojn kaj devas kritiki ilin pro tio. Judoj de la nuntempo dirus verŝajne, ke ĉe la prisilentado kaj ignorado de la judeco temas pri (kaŝita) formo de la antisemitismo. En la sube montritaj kazoj ne estas klare, ĉu tiuj esperantistoj intence prisilentas la judecon de Zamenhof aŭ ĉu ili faras tion, ĉar ili ne konas la historiajn faktojn kaj simple regurdas la propagandon de la Esperanto-movado, kiu parolas pri la „pola kuracisto Zamenhof“ jam de jardekoj. Ŝajnas ke oni povus skribi cent biografiojn pri Zamenhof kaj akcenti lian judan devenon, tio evidente ne helpus nek efikus, ĉar oni daŭre legas la miton kaj legendon pri la „pola kuracisto“ Zamenhof, tiel ke en la Esperanto-movado kaj ekster ĝi restas la kono (kaj malvero) de Zamenhof kiel pola aŭ rusa-pola kuracisto.

## 1 La svisa kazo



Möchtest du mit einem Film am Publikumspreis teilnehmen? Dann füll bitte das Formular aus, und gibt im Feld Haben Sie Fragen? "Publikumspreis". .  
[ANMELDUNG](#)

Die Jury bestand aus:

- Nelida Weidmann-Gonzalez, Svislando, Filmschaffende mit einem Diplom für Filmproduktion des SAE-Instituts in Zürich und dem Bachelor of Arts (Hons.) in Film der Universität Middlesex in London.
- SO Jinsu, Republik Korea, Professor für Wirtschaftswissenschaften, unterrichtet „Wirtschaftsgeschichte, Kulturökonomie“ an der Kangnam-Universität, Präsident des Instituts für Kunstmarkt, Spezialist für künstlerische Basar und YouTuber mit 450.000 Aufrufe.
- Linda Weidmann, Schweiz, Schauspielerin, Theaterpädagogin, Regisseurin, YouTuberin.

Organisation: Nelida Weidmann, Bachelor of Arts (Hons.), Digital Film Making der Middlesex Universität in London.

### ÜBER ESPERANTO

Das erste Esperanto-Lehrbuch wurde 1887 vom **russisch-polnischen Augenarzt** Ludoviko Lazaro Zamenhof in Warschau publiziert. Die Idee war es eine gemeinsame Sprache zur Verständigung für die gesamte Menschheit zu schaffen. Trotz grosser Vorurteile und Widerstände gegen diese Idee, hat sich Esperanto kontinuierlich weiterverbreitet und wird heute von mehreren Millionen Menschen in allen Ländern auf der ganzen Welt praktiziert. Zahlreiche herausragende Persönlichkeiten, darunter insgesamt acht Friedensnobelpreisträger, haben Esperanto gelernt und sich für die Verbreitung dieser Sprache eingesetzt.

Mehr Infos über Esperanto: [www.svisa-esperanto-societo.ch](http://www.svisa-esperanto-societo.ch).

Vd. <http://esperanto.ch/kurzfilmwettbewerb>

## 2 La dana kazo

Copenhagen Congress Centre under Universala Kongreso 2011 i København.  
(Foto: Stewen Brever © 2011. [Krea Komunajo BY-SA-2.0](#))

### Hvad er esperanto?

Esperanto er et internationalt sprog, som har til formål at virke som et *lingua franca*, dvs. som en tilføjelse til eksisterende sprog. Personer fra forskellige folkeslag, forskellige sprog og forskellige kulturelle baggrunde kan nemt kommunikere sammen på esperanto. En af fordelene ved esperanto sammenlignet med andre sprog, der også fungerer som et lingua franca, er, at esperanto bygger på et neutralt og ligeværdigt grundlag.

Sproget esperanto blev skabt af den **polske øjenlæge** Ludwik L. Zamenhof i 1887 i et forsøg på at forsimple international kommunikation. Sproget har en meget simpel struktur, som gør ellers komplicerede koncepter nemme at viderekommunikere. Alle ord er enten konstruerede af eksisterende ord, sådan at man kan forstå meningen af ordet uden nogensinde at have set det før, bare man kender det andet ord, eller så bruger det ord, som er brugt i mange af verdens forskellige sprog, sådan at så mange forskellige mennesker som muligt kan forstå det.

Af samme årsag kan man lære esperanto og blive flydende i det på, i gennemsnit, blot 150 timer. Dette betyder dog ikke at esperanto er et forsimplet sprog, som ikke kan anvendes til komplicerede konstruktioner som poesi og lyrik; der findes utroligt



Statue af Zamenhof i Prilep, Makedonien.

Vd. <https://dejo.dk/pri>

## 3 La pola kazo

Jam antaŭ jaroj mi konstatis, ke en la koncerna retpaĝo de Pola Esperanto-Asocio oni skribis pri la pola kuracisto Zamenhof. Post mia tiama publika atentigo oni tamen forigis la vorton „pola“ kaj lasis nur „kuracisto“. La koncerna truo, kie troviĝis la vorto „pola“, estas ankoraŭ bone videbla.

Ĉefa paĝo | Aktualiaĵoj | PEA | Pola Esperantisto

**PEA**

**Pola Esperanto Asocio / Polski Związek Esperantystów**

► Lingvo:

► Serĉilo

► Kontakto

Ĉefa Estraro de PEA  
str. gen. Wł. Andersa 37/59a  
00-159 Warszawa

**Ĉefa paĝo**

**Kio estas Esperanto?**

**Esperanto** estas la internacia lingvo, kiun kreis la pola kuracisto **Ludoviko Zamenhof**. La nomo "Esperanto" devenas de pseŭdonomo, per kiu Zamenhof publikigis sian "Unuan Libron" en la jaro 1887. En ĉi tiu libro, la kreinto prezentis la bazon de la lingvo en 16 gramatikaj reguloj.

Esperanto estas bazita sur indoeŭropaj lingvoj. Dank' al reguleco kaj facileco de gramatiko, ĝi estas pli facila ol aliaj lingvoj.

Zamenhof kreis neŭtralan lingvon por la internacia komunikado, por amikeco kaj paco. Li ne volis, ke Esperanto eliminu la naciajn lingvojn, sed estu la helpa lingvo.

Esperanto de 1887 ĝis nun nature evoluis, sed kun netuŝebleco de fundamento, pri kiu skribis Zamenhof en "Fundamento de Esperanto".

**PEA**  
Pola Esperanto Asocio / Polski Związek Esperantystów

► Lingvo:

► Menuo  
 ► Ĉefa paĝo  
 ► Aktualajtoj  
 ► PZE  
 ► Pola Esperantisto  
 ► Niaj eldonaĵoj  
 ► Kalendaro  
 ► Kontakto

**Ĉefa paĝo**

**Kio estas Esperanto?**

**Esperanto** estas la internacia lingvo, kiun kreis la kuracisto **Ludoviko Zamenhof**. La nomo "Esperanto" devenas de pseŭdonimo, per kiu Zamenhof publikigis sian "Unuan Libron" en la jaro 1887. En ĉi tiu libro, la kreinto prezentis la bazon de la lingvo en 16 gramatikaj reguloj.

Esperanto estas bazita sur indoeŭropaj lingvoj. Dank' al reguleco kaj facileco de gramatiko, ĝi estas pli facila ol aliaj lingvoj.

Zamenhof kreis neŭtralan lingvon por la internacia komunikado, por amikeco kaj paco. Li ne volis, ke Esperanto eliminu la naciajn lingvojn, sed estu la helpa lingvo.

Esperanto de 1887 ĝis nun nature evoluis, sed kun netuŝebleco de fundamento, pri kiu skribis Zamenhof en "Fundamento de Esperanto".

Esperanto posedas riĉan originalan kaj tradukitan literaturon.

La ĉefa tutmonda esperanta organizaĵo estas la Universala Esperanto Asocio, kiu estis fondita en la jaro 1908. La plej grandaj kunvenoj de esperantistoj estas Universalaj Kongresoj de Esperanto kiuj okazas ĉiujare en alia lando.

Vd. <http://esperanto.pl>

#### 4 Kiel la germanoj „elegante“ solvis la ĝenan problemon

Kiel oni povas „elegante“ solvi la problemon de la mencio de la judeco aŭ poleco de Zamenhof, montras la germana ekzemplo. En la koncerna paĝo de la oficiala retujo de Germana Esperanto-Asocio oni mencias nek la judecon nek la polecon de Zamenhof. Tio ankaŭ estas iom kurioza, ĉar en Germanio oni lastatempe klopodas „normale“ trakti ies judecon, precipe se temas pri historiaj faktoj. Ĉu do la germanaj esperantistoj intence malmencias la judecon de Zamenhof?

**Information**

- Was ist Esperanto?
- Geschichte des Esperanto
- Häufige Fragen (FAQ)
- Wer spricht Esperanto?
- Esperanto anwenden

Startseite » Information » Was ist Esperanto?

**Was ist Esperanto?**

Die internationale Sprache Esperanto ist gemeinsame zweite Sprache von Menschen in über 120 Ländern weltweit. Die Grundlagen dieser völkerverbindenden Sprache wurden 1887 von Ludwik Zamenhof in Warschau veröffentlicht. Seither hat sich Esperanto zu einer lebendigen Sprache mit einer aktiven Sprechergemeinschaft und einer eigenen Kultur entwickelt.

Esperanto ist relativ schnell erlernbar - etwa in einem Viertel der Zeit, die man für Sprachen wie Englisch oder Spanisch braucht. Die Grundzüge des Esperanto kann man in der Regel bei zwei oder drei Wochenendkursen lernen. Die Sprache hat eine einfach aufgebaute Struktur und sie ist regelmäßig.

Esperanto ist neutraler als andere Sprachen, weil es keinem Land einen besonderen Vorteil gegenüber anderen Ländern bietet.

**Lebendige Sprache**

Esperanto ist eine lebendige Sprache, die bei [internationalen Treffen](#) von Jugendlichen, Erwachsenen und [Familien](#) verwendet wird. Jährlich erscheinen rund 100 [Bücher auf Esperanto](#). Es gibt regelmäßig erscheinende Zeitschriften und [Esperanto-Musikgruppen](#), die auch bei [youtube](#) zu finden sind. Der Radiosender

**Videos**

Vd. <https://www.esperanto.de/de/enhavo/informi/was-ist-esperanto>



## 5 La ekzemplon de la germanoj sekvis cetere ankaŭ la esperantistoj de Aŭstrio (aŭ ĉu eble inverse):

The screenshot shows a web browser window displaying the Esperanto website. The page title is "Was ist Esperanto?". The content includes a definition of Esperanto as an international auxiliary language, its history, and its goals. A world map highlights Esperanto organizations. The browser's address bar shows "www.esperanto.at/esperanto-die-sprache/". The taskbar at the bottom shows several PDF files that failed to download.

Oni do povas observi, ke la supre nomitaj asocioj forviŝis en siaj retpaĝoj ĉiujn judajn spurojn de Zamenhof. Tio signifas, ke en tiuj asocioj oni ŝajne ne estas aparte interesata emfazi la judecon de Zamenhof. Ĉar en la Esperanto-movado oni volas eviti la impreson, ke Esperanto estis juda afero. Eble ĝuste pro la diskutoj en la pasinteco, ĉu Zamenhof estis judo, polo, ruso aŭ filo de Litovio, en certaj Esperanto-medioj oni rezignas pri klara deklaro de la etna kaj nacia aparteno de Zamenhof. Fakte, Zamenhof deklaris sin „ruslanda hebreo“, sed en la Esperanto-movado kaj propagando tiu deklaro neniam estis populara (ekzemple por tiamaj francoj „Ruslando“ kaj „hebreo“ estis preskaŭ hororaj konceptoj); do oni preferis prisilenti ĝin, favore al la versio de la „pola kuracisto“ Zamenhof, kiu estis uzurpita unuavice de la polaj esperantistoj kiel polo, ĉar ili konsideris Zamenhofon „filo de la pola tero“, kiel kia Zamenhof fakte ankaŭ deklaris sin (cetere, kiel ŝtato Pollando ne ekzistis en la vivotempo de Zamenhof). Ne nur en polaj medioj oni evitis mencii la judecon de Zamenhof, sed ankaŭ la komunistoj, kiuj staris sub la impreso de la kontraŭcionismo, kiu estis oficiale praktikata en ĉiuj komunisme regataj landoj, evitis emfazi ĝin. Do, kaj ĉe polaj naciistoj kaj ĉe komunistoj, inter kiuj retroviĝis ankaŭ multaj esperantistoj, la subpremado de la mencio de la judeco de Zamenhof falis sur fekundan grundon, fakte ĝis nun. Pravigon por tiu praktiko cetere donis Zamenhof mem, kiu siatempe rekomendis en Francio, kiu estis trafita de antisemitisma ondo, eviti la specialan emfazon de sia judeco. Do, la problemo estas efektive iom komplika. Sed en la nuntempo la emfazado de ies judeco, ekzemple de Zamenhof, ne plu devus signifi problemon (sed male honoron), malgraŭ daŭre vastaj antisemitismaj sentoj ĝuste en landoj kiel Pollando, Germanio kaj Aŭstrio, kiuj povas esti nomataj klasikaj landoj de la historia antisemitismo (kvankam tie ekzistis ankaŭ klopodoj por integri kaj asimiladi la judojn).

Mi ne esploris aliajn retujojn de Esperanto-asocioj, sed mi ne mirus, se ankaŭ en ili mankus indiko pri la juda Zamenhof. Kaj mi estas certa, ke ankaŭ post tiu ĉi komento nenio ŝanĝiĝos.

[www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch), julio 2020